4-a Jaro. N-o 177 APERAS  SEMAJNE 23. Februaro 1928

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e Gvidanto: E. Lanty | SIDEJO de Ekzekutiva Komitato de SAT 23, rue Boyer, Paris-20e | ADMINISTREJO: Colmstr. 1, Leipzig O 27 Administranto: R. Lerchner

LA KLASBATALO EN JAPANIO

Ekonomia krizego jam delonge daŭranta pereigis multajn malgrandajn kaj mezajn entreprenojn. Du aŭ tri trustoj regas la diversajn industriojn de tuta Japanio. Samgrade la burĝa politika pozicio rapidege disvolviĝis kaj antaŭeniris al faŝismo. Nobelaro, restaĵo de feŭdala sistemo, estas unuigita de la blanka mano de l' burĝaro kiel faŝista gvardio. La ĉefministro Tanaka, generalo modele faŝista, deklaris pri la ĉefaj celoj de tiu faŝismo: 1. Propagandado de patriotismo, 2. Organizo de blanka armeo, 3. Malhelpo de strikoj, 4. Blanka edukado de studentoj, 5. Pereigo de komunismo!

Por faŝistigi la soldatojn, junulojn kaj virinojn, la registaro eluzas ĉiujn burĝajn organizojn: Radion, burĝajn ĵurnalojn kaj memorfestojn de pasintaj militoj. Asocio de faŝistoj subvenciata de l' registaro naskiĝis celante subpremi la laboristan movadon. En festo de la Oktobra Revolucio multaj proletaj asocioj estis atakataj de armitaj faŝistoj.

La ĝeneralaj vivkondiĉoj de la popolo pli kaj pli malboniĝis. 300 000 laboristoj estas lokaŭtitaj, kaj ili malsatas kun la familioj. Manko de nutraĵo kaj malpuro de la domoj malsanigas multajn laboristinfanojn kaj mortigas ilin sekve de la lokaŭto, ĉar la kuracistoj rifuzas kuraci monon malhavantajn laboristojn. Kaj tiuj-kiuj laboras, devas labori 9—13 horojn en malpuraj fabrikoj. Nokta laboro de junaj virinoj estas ankoraŭ permesata en ŝpinejoj kaj minejoj. Okazas multaj proteststrikoj pro malaltigo de la tagsalajro. Sindona lakeo de burĝo, policano kaj faŝisto, malhelpas strikon per forto, atako; enkarcerigo kaj mensogo. Sen-



kulpaj laboristoj estas malliberigataj en malsanigaj karceroj.

Ni sufiĉe spertas, ke la juĝistoj estas reprezentantoj de la burĝa klaso. Kiel hundoj multegaj detektivoj observadas konstante aktivajn komunistojn, timante disvolviĝon de laborista agado. Malliberigitaj laboristoj sole rajtas legi librojn de religia enhavo. Por sin ŝirmi kontraŭ faŝistaj atakoj, Laboristaro organizis junlaboristajn batalantarojn. Oni tute ne timas la malliberiĝon kaj bataladas kontraŭ forto de l' burĝaro. Proletaj gazetoj, paroladoj kaj manifestacioj ofte estas malhelpataj per kruela rimedo de l' registaro. Ni deklaras, ke la japana leĝo por presaĵoj estas la plej severa en la tuta mondo. Malgraŭ tia kondiĉo multe da tradukoj el la verkoj de Marks kaj Lenin flugis en urbojn kaj kamparon (300 000 volumoj de "Marks, La Kapitalo"). Ĉiuj verkoj de Lenin estas tradukitaj. Tiu ĉi fakto garantias la disvolviĝon de japana proleta movado.

Aliflanke la plej kruele subpremataj proletoj de Koreo kaj de Formoso rapidege revoluciiĝis, batalante kontraŭ la registaro, kiu en ambaŭ landoj estas grandburĝa-entreprenista. Multaj loĝantoj tiulande estas forpelitaj el siaj hejmoj. La japanaj kamparanoj, kiuj reprezentas la plimulton de l' loĝantaro kaj vivas en plej mizeraj kondiĉoj, unuiĝis kun la kuraĝaj urbaj laboristoj.

Ni trovas en Japanio nuntempe similan socian situacion, kiel estis en Rusio dum la socia krizo de 1905. Proletaj gazetoj klopodas propagandi "militon kontraŭ la milito", ĉar en najbara Ĉinio niaj klasfratoj estas buĉataj en sia lukto kontraŭ imperialismo ankaŭ kaj ĉefe de japanaj militistaroj. Ni helpu al niaj revoluciemaj ĉiniaj K-doj!

Tokiano.

Malmultaj estas ni, ni estas malmultaj nombre.
Pluvo, vento, uragano!
Amasiĝante — neniam disiĝu!
Mallevu la standardon!
Levante ĝin, marŝi neoportunas,
Ĉar ni povas esti forblovitaj.
Ĝis kiam la tero haltos turnadon,
Neniam forlasu esperon al la tagiĝo.

El la japana poemo: "Mallevu la standardon", Hajime I.

LA SOLA EN LA TUTMONDO

Kial ni, proletoj, festu dekjaran datrevenon de Sovetia Ruĝa armeo?

Ni, proletoj, estas kontraŭmilitemuloj. Ni malamegas, ni ne povas eĉ pensi trankvile pri armeoj, pafiloj, militistoj. Eĉ se ni vidas ilin, ni kun abomenego rememoras terurajn jarojn 1914—1918, kiam milionoj da niaj fratoj nur pro kaprico de kapitalistoj kaj por iliaj interesoj mortadis sur kampoj de la landaro Mezeŭropa.

Kaj tamen ni, proletoj, d e v a s sincere kaj plenkore partopreni festadon de la 10-jara datreveno de Ruĝarmeo Sovetia, kiu okazos 22—23-an de februaro 1928.

Kial? Ĉar Ruĝa armeo tute ne similas aliajn armeojn. Ĉar ruĝaj soldatoj estas batalantoj por la klaso proleta, sed ne uniforme vestitaj buĉistoj, laŭ ordono de kapitalistaro sufokantaj Laboristaron. Ĉar ruĝarmeanaro estas la antaŭeca, la plej kuraĝa ero de la loĝantaro Sovetia, al kiu lando ĉiu proleto de la tutmondo turnas sian atenton kaj siajn batalesperojn.

Ruĝa armeo estas ido de la proleta Revolucio, naskita de tiu Revolucio kaj ĝin kuraĝe defendinta. Kiam eksplodis la unua Revolucio en Rusio en la jaro 1905, laboristoj de Moskvo, Leningrado, Varsovio kaj aliaj grandaj industriaj urboj, sin arminte, fondis revoluciajn bataltaĉmentojn, kiujn oni nomis "Ruĝa Gvardio". Laboristojruĝgvardianoj luktis sur barikadoj, detirante la kronon de cara kapo. Ili malvenkis en 1905; mortintaj viktimoj, sangaj oferoj ne alportis la venkon. Sed en la jaro 1917 iama eksperimento estis venkoplene ripetita: en februaro de 1917 ruĝgvardianaj taĉmentoj renversis caran reĝimon, en Oktobro — ili forpelis kapitalistojn. La ruĝa gvardio almilitis potencon en manojn de Proletaro.

Dum Oktobra Revolucio al ruĝgvardianaj taĉmentoj aliĝis soldatoj kaj maristoj de iama cara armeo kaj militŝiparo. Ili kune batalis sur la barikadoj kaj defendis junan proletan ŝtaton kontraŭ atakoj kapitalistaj, kiuj provis realporti malnovan reĝimon. Unu generalo post la alia — Denikin, Judeniĉ, Kolĉak, Vrangel, Krasnov, Dutov k. a. atakis la Sovetan landon, ĉirkaŭis, blokadis ĝin. Tiam la registaro de laboristoj kaj kamparanoj vokis volontulojn-laboristojn soldatiĝi, kaj el Ruĝa Gvardio naskiĝis volontula ruĝa armeo. Sed kvanto de malamikoj kreskis, kreskis ilia forto, necesis pli kaj pli da soldatoj. Tiam la registaro decidis fondi devige-varbatan ruĝan armeon, pri kiu estis dirita en la registara dekreto (leĝo) jeno:

Malnova armeo servis kiel ilo de klasa subpremo de burĝaro al laboristoj. Post transiro de la potenco al laborulaj kaj ekspluatataj klasoj, aperis neceseco fondi novan armeon, kiu estos apogo de Soveta potenco nune, fundamento por anstataŭi konstantan armeon per la tutpopola armiĝo dum la proksima estonto kaj ankaŭ ĝi estu helpilo por la venonta sociala revolucio en Eŭropo.

La du unuajn celojn jam plenumis Ruĝa armeo. Dum la civitana milito kaj nun ĝi estis kaj estas apogo de la Soveta registaro, ĝi forpelis ĉiujn multmilajn armeojn de blankaj generaloj kaj donis eblecon al la Laborularo de Sovetio libere spiri. Nur dank' al venkoj de Ruĝa armeo laboristoj kaj kamparanoj de USSR nun povas trankvile vivi kaj plibonigi sian ekonomian kaj kulturan staton.

La Ruĝa armeo plenumas la duan taskon — tutpopolan armiĝon. Fonditaj ruĝarmeaj teritoriaj (milicaj) regimentoj ebligas militinstrui kaj prepari por la batalo tutan viran laborulan loĝantaron de USSR. Kaj ankaŭ virinoj, eĉ maljunuloj kaj infanoj volonte studas militarton, por ke okaze de novaj atakoj de kapitalistoj ili povu kun batalilo en manoj lerte defendi sian liberecon. Sufiĉas diri, ke volontula asocio OSO-Aviaĥim (asocio por helpo al la land-defendo) nun enhavas en siaj vicoj 2 516 340 anojn.

Nun venas plenumo de tria celo — helpo al la Revolucio tutmonda. Ruĝa armeo estas ĉiam preta por tio. Ruĝarmeanoj montras bonan konscion de internacia laborula solidareco: 240 000 ruĝarmeanoj — t. e. 43 % de l' tuta Ruĝarmeo estas anoj de IRH kaj helpas laŭpove al eksterlandaj fratoj — katenigitaj batalantoj de la revolucio. Necesas nur signalo, nur la unua eksplodo, por ke Ruĝa armeo ne nur per mono kaj donacoj helpu al eksterlandaj klasbatalantoj. Multaj divizioj de Ruĝarmeo havas kiel "ĉefojn" (honorprotektantojn) Laboristaron de Anglio, Germanio, Francio, Italio, Ĉeĥoslovakio, Norvegio, Finnlando kaj aliaj landoj, kaj ruĝarmeanoj ĉiam estas pretaj praktike helpi al siaj protektantoj.

Ni konkludas: Ruĝa armeo estas naskita de la proleta Revolucio por batalo kontraŭ imperialismo. Ruĝa armeo servas por la klasaj celoj de Laborularo, el kies anoj mem ĝi konsistas: en Ruĝarmeo estas inter ĝiaj anoj 17,7 % da laboristoj, 71,3 % da kamparanoj kaj 11 % da laborantaj intelektuloj. Ruĝa armeo ne limigas sin en mallarĝaj naciaj limoj: ĝi estas ĉiam preta batalanto por Revolucio tutmonda.

Tial, Proletaro tutmonda, fratece festu gloran 10-jaran datrevenon de Ruĝa armeo. Kaj precipe festu ĝin nun, kiam mondkapitalistaro preparas novajn militojn, en kiuj Ruĝa armeo estos nia defendanto kontraŭ imperialismo, defendanto de la tutmonda Proletaro, portanta sur sia standardo gloregan devizon: "MILITON KONTRAŬ LA MILITO MEM!" 5241.

N. LENIN:

Ŝtato kaj Revolucio

150 paĝoj, formato 12×18 cm. Prezo 1 mk. g.

Mendu tuj ĉe la Administracio de SAT

R. Lerchner, Colmstr. 1, Leipzig O 27

SOLENA PROMESO (MILITJURO) DE RUĜARMEANOJ

1. Mi, filo de la laborula popolo, civitano de Soveta Socialista Respublikara Unio akceptas por mi la nomon de militisto de Laborista kaj Kamparana Ruĝa armeo.
2. Ĉe okuloj de la laborantaj klasoj de USSR kaj de la tutmondo mi promesas porti tiun ĉi nomon honeste, konscience studi la militarton kaj kiel pupilon de la okulo gardi popolan kaj militistan havaĵon kontraŭ difektiĝo kaj detruo.
3. Mi promesas severe kaj ne flankiĝante sekvi revolucian disciplinon kaj senkontraŭdire plenumi ĉiujn ordonojn de komandantoj, instalitaj per potenco de Laborista kaj Kamparana registaro.
4. Mi promesas deteni min mem kaj miajn Kamaradojn de ĉiuj agoj, malhonorantaj kaj humiligantaj indecon de civitano de Soveta Socialista Respublikara Unio, kaj ĉiujn miajn agojn kaj pensojn direkti al la grandega celo — liberigo de ĉiuj laboruloj.
5. Mi promesas tuj post la unua alvoko de la Laborist-Kamparana registaro batalelpaŝi por defendo de la Soveta Potenco kaj en batalo por Unio de Sovetaj Socialistaj Respublikoj, por afero de socialismo kaj frateco de la popoloj ne ŝpari miajn fortojn kaj eĉ la vivon mem.
6. Se pro malbona konscio mi ne plenumos tiun mian solenan promeson, do estu mia sorto — ĉies malestimo kaj punu min severa mano de la revolucia leĝaro.

EL AMERIKO

Brazilio

La Laborista federacio de la ŝtato Rio Grande do Sul okazigis je la 1. januaro kongreson en la urbo Pelotas, al kiu estis invititaj ĉiuj laboristaj organizoj de ĉiuj unuopaj ŝtatoj kaj distriktoj de Brazilio. Preskaŭ ĉie jam ekzistis iuj laborist-organizoj, sed ili ne havis unuecan kunligiĝon. La fondo de Fedraçao Operaria Regional Brasileira forigas tiun mankon. Amsterdama Internacio ŝajne ricevis malĝustan informon pri tio, ĉar ĝi raportis antaŭ kelka tempo en sia gazetinformilo, ke nun en Brazilio konstituiĝas sekcio de ĝia direkto. Laŭ niaj informoj ekzistas tie la sekvantaj laboristaj organizoj:

En la Ŝtato Rio Grande do Sul reformista movado ne ekzistas. Tie troviĝas kelkaj laboristaj unioj (Unioes Operarias), kiuj estis fondataj fine de la pasinta jarcento, sed hodiaŭ nur ankoraŭ estas poramuzaj unuiĝoj sen rilatoj al la klasbatalo de l' Proletaro. — La Ŝtato Sao Paolo estas la industriregiono de Brazilio. La laborista movado estas anarkisindikatista. Post la lasta politika revolucio ĉiuj sindikatoj estis nuligataj per oficialaj dekretoj kaj estas parte ankoraŭ hodiaŭ subpremataj. La bolŝevistoj kaj reformistoj tie ne ankoraŭ povis aperi. — En la ĉefurbo Belem de la Ŝtato Para ekzistas kelkaj sindikatoj, kiuj apartenas al ILA[1]). Krom ili estas kelkaj memstaraj malgrandaj sindikatoj, kiuj aliĝis al neniu internacio. — En Pernambuco kun la ĉefurbo Recife ekzistas malgrandaj sindikatoj, kiuj troviĝas en la manoj de komunistoj. En la ŝtato Bahia kun la ĉefurbo San Salvador la sindikata movado estas subpremata flanke de la reakcio. En la ŝtato Minas Geraes kun la ĉefurbo Belorizonte ekzistas kelkaj anarkisindikatistaj kaj katolikaj sindikatoj. Ankaŭ en Mato Grosso la laborista movado estas malforta. — En la ĉefurbo de la lando Rio de Janeiro, la movado disfalis en diversajn tendencojn: la anarkisindikatista kaj la komunista. Ekzistas krome la oficistsindikatoj kaj la organizo de la maristoj kaj havenlaboristoj. En la ŝtato Parana nur troviĝas malfortaj sindikataj organizoj anarkosindikalistaj.

La registaro kreis leĝon, laŭ kiu povas esti malpermesataj kaj nuligataj ĉiuj laboristaj organizoj. Ĝi ĉefe celas la anarkisindikatistojn. Sed la fakto, ke oni okazigis tutbrazilian kongreson, pruvas, ke la registaro ne kapablas subpremi la revolucieman spiriton en la laborista movado. Okaze de la manifestacioj por Sacco kaj Vanzetti estis arestataj kelkaj K-doj, inter ili la K-doj Domingos Passes, José Romero kaj Edegar Luernet, sed ili estas reliberigitaj dume.

[1]) Internacia Laborista Asocio (Berlina Internacio).

Meksikio

La “Confederacion General de Trabajadoros“ (Ĝenerala Konfederacio de l'Laboristoj) en Meksikio, aliĝinta al ILA, dissendis cirkuleron al ĉiuj siaj lokaj organizoj, en kiu ĝi atentigas la fakton, ke en la lando ankoraŭ konstante estas persekutataj revoluciemaj laboristoj pro siaj konvinkoj. Nuntempe la K-doj Librado Rivera, Florentino Ibarra kaj Francisco Flores troviĝas en la malliberejo de Andonegui en Tampico, Tampe. Oni kulpigas ilin esti incitintaj la Proletaron kontraŭ la registaro en publikaj kunvenoj kaj per pamfletoj. Oni asertas, ke la prezidanto de la meksika respubliko estis publike atakata en la gazeto “Sagitario“. Ĉi tiu estis malpermesata kaj la respondecaj eldonantoj arestataj. Vere la “krimo“ de niaj K-doj estis tiu, ke ili malkaŝis kaj riproĉis la sovaĝan buĉadon de la Jakvis-indianoj per la armeo de la ŝtato Sonora por la interesoj de la grandbienuloj kaj la eksprezidanto Obregon.

CGT komisiis siajn lokajn organizojn, ĉiuloke fondi agadkomitatojn por la reliberigo de la arestitaj K-doj. Meritas esti menciate, ke Rivera estas maljuna pioniro, kiu dediĉis sian vivon al la plibonigo de la situacio de l' Proletaro. — La K-doj de ĉiuj landoj estas petataj protesti ĉe la meksikaj ambasadorejoj kontraŭ la aresto de la tri K-doj kaj postuli ilian liberigon.

Laŭ la esp. Gazetservo de ILA.

EL SENDEPENDA ESTONIO

La respubliko Estonio deziras esti tre konata al eksterlando. Tiucele oni fondis iam specialan ministerion. Mi kiel fidela civitano plenumas mian ŝtatan devon, prezentante Estonion al la tutmonda legantaro de “S-ulo“. Mi esperas, ke la eksterlandanoj konvinkiĝos, ke troviĝas en la mondo unu “grandega“ kaj “riĉega“ regno Estonio.

La ekonomia situacio ĉiujare, ĉiutage pliakriĝas. Grandaj fabrikoj malfunkcias jam de multaj jaroj, inter ili “Dvigatel, kiu antaŭe laborigis 4000 laboristojn, “Peetri“, “Vene - Balti“ (ŝipfabriko) ktp. Nun tiuj fabrikoj putriĝas, vastegaj konstruoj detruiĝas, neniu pri ili zorgas. Senlaboreco kreskas ne nur en urboj, sed ankaŭ en kamparo. Ŝtatan subvencion oni ne pagas en Estonio al la senlaboruloj. Nur la komunumajn helplaborojn oni aranĝas, sed tiun “luksan ĝuon“ nur havas familiuloj, ne izoluloj. Senlaboreco same kreskas inter cerblaboristoj. Trafan ekzemplon pri tio montras organo de la reganta klaso “Vaba Maa“ (Libera Tero), kiu komunikas: “Senlabora intelektularo estas tiel granda, ke ni havas pli ol centon da aspirantoj, kiam ni postulas simplan oficiston, inter ili multe da bonkvalitaj personoj. Tiel aŭtune aspiris pro la posteno de lerneja servisto 2 personoj kun pli alta eduko (ili finis universitaton) kaj multaj finintaj la mezlernejon.“

Pri la nova ŝtata buĝeto skribas la plej granda organo de la reganta klaso “Päevaleht“: “Niaj buĝetoj estas ja ekvilibraj ĉiujare, sed opozicio pro ilia ekvilibrigo ĉiujare kreskas. La buĝetoj proponataj de oficejoj ĉiam superas per grandaj sumoj la antaŭvidatan enspezon. El tio ni vidas, ke la elspezoj kreskas pli rapide ol la enspezoj, kaj ke de jaro al jaro ĉiam pli da ekonomiaj bezonoj restas nekontentigitaj.“

La popolnombro estas stabila, kaj ankaŭ la bezonoj de la popolo estas ĉiujare eksterordinare stabilaj. Tio vekas la impreson, kvazaŭ ni atingis la limon de nia kapableco. Stabiliĝis ankaŭ la armeo de impost-ŝuldantoj, pri kiu indignas la polico, kaj kiu ŝarĝas la satiĝeman impost-aparaton. La regantoj nun staras senkonsile antaŭ la problemo de impostŝuldo, ĉar ĉio, kion oni povis forpreni de iu, estas prenita, ĉu kudromaŝino de tajloro, botŝtipoj de botisto, ĉu veturilo de fiakristo kaj ĉevalo, aŭ bovino de iu kabanulo. Sed tamen ŝarĝo de ŝuldantoj kreskas ĉiujare pli multe, ol postulantoj kapablas ricevi per punpagoj, kiuj kreskas jare je 24 %.

La 24-an de februaro Estonio jubileos sian dekan datrevenon. Tiuokaze burĝa ĵurnalaro skribas malĝoje, ke oni ekonomie devas konstati malkreskon, ke la Laboristaro neniam havis tiajn mizerajn vivkondiĉojn kiel nun!

Kaj kia humoro regas en la literatura kampo? Ĉiun versaĵon, romanon ktp. trairas kiel ruĝa rubando la konstato, ke ne ekzistas pli malbona, perforta, maljusta krimonesto ol la respubliko Estonio kaj ĝia nuna registaro. Ĉiu “defendligano“ estas fripono, diboĉulo, mortigisto. Policanoj trenas senkulpulojn en la malliberejojn, kaj militjuĝistaro mortkondamnas ilin.

Sed la ĵurnalaro skribas resume jenon: “Kvankam Estonio estas malgranda kaj malriĉa inter aliaj regnoj, tamen ĝi ne bezonas honti pro tio, ĉar ĝi havas la regnan sendependecon, kaj tio estas valoraĵo, kiun

oni devas defendi ĝis "la lasta sangoguto" (!).

Bela logiko: Persistu sen sufiĉe da nutraĵo, vivu nudkorpe; malsaniĝu, putriĝu, mortu, sed ne hontu, vi ja havas "regnan sendependecon"!?

Aŭ kiel eĉ povas vivi tia lando, kiu antaŭe estis parto de alia regno? Apartenis al alia cirklo de ekonomio? Tio estas kvazaŭ fortranĉi de korpo manon aŭ piedon: La korpo postvivas, sed la fortranĉita korpoparto putros kaj formortos. 10438 — T ü r i.



TAGO EL MIA VIVO

Mi estas ministo kaj loĝas en karbminejo distanca 3 kilometrojn de urbo S t a l i n g r a d en Sovetio. Mia loĝejo estas komuna por dek personoj. Ĝi konsistas nur el du ĉambroj kaj havas kvar fenestrojn. La unua ĉambro servas kiel kuirejo (granda 8 : 4 m); en ĝi nur dormas la kuiristino. En la dua loĝas dek fraŭloj. Ĝi havas grandecon de 8 : 7 metroj, sed ne estas tre komforta kaj bonmeblita. Laŭ rusa kutimo muro de ĉambromezo kaj plafono estas ŝmiritaj per mortero kaj la muro ornamita per iu pentraĵo el la Revolucio. Sur la ligna planko staras dek ferlitoj kun simpla matraco, ĉe muro ŝranketo kaj skribtablo kovrita per ruĝa tapiŝo, sur kiu kuŝas libroj kaj ĉiutage nova ĵurnalo senpaga. Vespere ni havas elektran lumon tre oportunan.

Mi ellitiĝas je la 4-a horo matene kaj matenmanĝas en la kuirejo post lavo frititajn terpomojn kun lardo. Post rapida manĝo mi trinkas kruĉon da teo aŭ lakto, kaj post kelkaj minutoj mi aŭdas la sonon de fajfilego. Je la 5-a horo mi foriras al ŝaktokorto, kie mi devas eniri vaporbanejon kaj surmetas laborvestojn. Post 15 minutoj mi estas preta, por akcepti lampon. Ĉeflaboristo donas al mi taskon kaj notas labornombron mian. Poste mi sidiĝas kun K-doj apud la laborejo kaj babilas ĝis la 6-a. Tiam mi marŝas sur larĝa ŝtuparo al puto de la ŝakto. Leviĝas el ŝakto la kaĝo, kiu havas du etaĝetojn kaj lokon por 12 personoj. Post 4-foja signalo la lifto komencas malsupreniri al profundo de 240 metroj. Post 3 minutoj mi atingas la subteran vojon; kiu konsistas el du fervojetoj (?). Ambaŭflanke muro kaj plafono estas betonitaj. Laŭ tiu ĉi vojeto mi marŝas norden kaj renkontas krucvojetojn: okcidenten kaj orienten $^4/_{10}$-a karbtavolo. Mi ĝisiras laborlokon. Dume pasis ¾ horo. Mi tuj komencas labori, portante tavoletojn aŭ borante strateton por alkonduki freŝan aeron, kie karbhakisto laboras. Ĉar nia ŝakto estas danĝera, mian laboron severe observas la ĉeflaboristo.

Post laborfino mi remarŝas al la puto de l' ŝakto kaj devas iom atendi, ĝis kolektiĝis 12 homoj. Post suprenleviĝo mi rapidas redoni la lampon, lavas min en vaporbanejo, ŝanĝas vestojn kaj revenas hejmen je la 13-a. Mi sentas min iom laca, tuj tetrinkas kaj tagmanĝas (barĉon kun viando kaj kaĉon kun iom da lakto — ne tre bongusta manĝaĵo). Poste mi iom kuŝiĝas por ripozi. Tiam revenas aliaj K-doj, kaj ni interparolas pri laborstato aŭ iuj okazintaĵoj. Venas vizitanto de profunuiĝo, kiu por ni estas grava konatulo, ĉar li demandas, kio mankas aŭ ĉu estas iaj plendoj. Li notas en libreto, sed ĝi restas sur papero. Post unuhora babilado mi iras al lago kun fiŝkaptilo kaj amuziĝas ĝis vespero. Tiam mi kutime vizitas la lokan klubon aŭ aŭskultas Radion aŭ promenetas en la ĝardeno aŭ rigardas prezentadon de KIM (Komjunularo). Post vespermanĝo mi ankaŭ okupas min pri legado de libroj kaj gazetoj kaj studas esp-on aŭ skribas leteron al la eksterlandaj K-doj, kun iom da malĝojo, ĉar iu K-do ĉesigis la korespondadon kun mi. Tiel mia tago de ministo de Siglova karbminejo finiĝas je 24-a horo, kaj mi enlitiĝas por daŭrigi alian matenon.

F. I b r a g i m o v, 3782.

Protesto

Mi protestas, ke vi en "S-ulo" presigis artikolon pri B e r B o r o ĥ o v, la juda paolo-cionisto, ĉar tiu estas komparebla al la kristanaj socialistoj en Vieno aŭ la naci-socialistoj en Ĉeĥoslovakio. La cionistoj volas laŭ juda maniero aĉetadi Palestinon de la araboj je marĉandaj prezoj.

Ĉu ni laboristoj bezonas apartan landon aŭ patrion? Ĉu ne la tuta mondo devas esti la nia? D. K l a ĝ i n, Nov-Jorko.

Patriotismo — Internaciismo — Sennaciismo

(Daŭrigo deksesa)

Kelkaj konsideroj pri la Roma Imperio kaj la tiutempa patriotismo

La stariĝo kaj forfalo de tiom granda kaj potenca imperio estas temo, pri kiu diskutadis kaj ankoraŭ nuntempe diskutadas historiistoj kaj filozofoj. Multege da dikaj libroj estas jam verkitaj por respondi la demandon: ĉu la venko de la Romanoj bonefikis aŭ ne sur la evoluon de la homaro. Ĉu, ekzemple, la romana kulturo, kiu sin trudis al la Galloj, al la Bretonoj kaj multaj aliaj popoloj, ne premsufokis ilian propran genion? Ĉu tiuj popoloj ne sukcesus akiri per siaj propraj rimedoj originalan kulturon, kiu eble multe superus tiun de la Romanoj? Kaj ĉu do ne estas bedaŭrinde, ke popolo kiel la greka, kiu estis pli kulturita, pli delikatigita ol la romana, lasis sin venki de tiu lasta?

Tia debato ŝajnas al ni tute vana. Fakto restas fakto. Ne utilas diskuti pri tio, kio okazus, se la rado de la Historio turniĝus en alia direkto. En la fakto, ke grandaj imperioj ekzistis en la Antikveco, ni simple vidas ian naturan leĝon ekonomian, kiu kvazaŭ ordonas al la homoj, ke ili pli kaj pli larĝigu siajn sociojn.

La homo ĉiam deziris akiri pli kaj pli da komforto, da bonstato. Tiu deziro instigis lin inventi, produkti, interŝanĝi. Tial estiĝis Ekonomio, kiu havas siajn proprajn leĝojn, al kiuj obei devas la homo. Latenta (kaŝa) solidareco ja kunligas ĉiujn partojn de l' mondo. La produktoj de iu regiono mankas en alia. Interŝanĝado fariĝas necesa. Se popolo ne volas aŭ ne kapablas ekspluati la naturajn riĉaĵojn de sia regiono, okazas malekvilibro en la Ekonomio. Kaj plej ofte milito sekvas por restarigi la ekvilibron. Sendube aliaj faktoroj ludas rolon. La homa ambicio ekzemple ne estas malatentinda forto. Ĝi estas tamen akcesora kaj eĉ povus nenion fari se mankus objektivaj kondiĉoj favoraj.

Ni konsideru iomete la demandon pri la "venkitaj" Grekoj. Kio rezultis el tiu venko? Ĉu malaperis ilia pli delikata kulturo? Tute ne. Okazis male, ke la "venkitoj" trudis sian kulturon al la venkintoj mem:

"La malnova arto de Romo estis tiu de Etrurio, tiu de Kampanio kaj de Norda Italio, kiun, laŭ la daŭro de siaj historio kaj konkeroj ĝi alproprigis al si. Estante ĉefurbo de Italio, ĝi sintezigis la genion de la tuta duoninsulo. Dum la daŭro de la II-a jarcento, la italiaj tradicioj iom post iom cedis la lokon al tiuj de la tiutempa Grekio. Ĉe la I-a jarcento, la revolucio efektiviĝis kaj la romana arto fariĝis tute greka."

"Okazis ĉe Romo, tiutempe, fenomeno analogia al tiu konstatebla en Francio je la XVI-a jarcento. Principoj pri nova arto subite invadis la landon, forpuŝante la malnovajn formojn, subpremante ilin aŭ almenaŭ lasante al ili nur latentan (dormantan) vivon. La efiko de la romanaj militiroj en Grekion kaj Azion povas esti komparata al tiu de la francaj militiroj en Italion, kiuj naskis Renesancon . . ."

". . . Komence, la Romanoj miregis; poste ili admiris kaj ŝatis tiujn belaĵojn, per la glavo akiritajn . . . Sed ne nur artaĵoj alfluis al Romo, sed ankaŭ artistoj . . . Cetere ne estis unuopaj artistoj, sed tutaj aroj da artistoj, kiuj venis al Romo kaj tie instaliĝis . . . Kun ili la greka arto sin trudis, enradikiĝis kun siaj temoj, kun sia stilo kaj siaj teorioj. En la arto, same kiel en la sciencoj, en

IMPRESOJ PRI SOVETIO

de okulvidinto, orelaŭdinto, fingrotuŝinto

(Daŭrigo kvara)

Sur strato

Kelkajn horojn post mia alveturo en Moskvo, mi skribis al K-do Glodeau: "Nehelaj estas miaj unuaj impresoj...", kaj iom pli poste: "Helaj estas miaj impresoj", — ĉu vi memoras, kara amiko mia?

La unuan tagon ja akceptis nin la pluvo, kotplena estis la stacidoma placo, kaj unu almozpetulon mi renkontis. Tuj mi emis diri: ĉiam pluvas en Moskvo, koto plenigas ĉiujn stratojn, nur almozpetulojn oni renkontas.

Multaj personoj, al kiuj mi favore parolis pri Sovetio, depost mia reveno riproĉis al mi: "Vi estas komunisto, sekve viaj konkludoj ne valoras. Blindigas vin via partianeco, ktp." Jes, blindigis min mia partianeco, tion mi mem plene konscias — sed vere eksterordinara estis blindiĝo mia: multajn sukcesojn de laborista agado ne kapablis trafi miaj okuloj, sed ĉiujn malsukcesojn ili tutklare vidis. Ĉion mi rigardadis kun severa atentemo, kaj ofte el nebela okaza fariĝo mi faris malbelegan ĉiaman skandalon. Tiel la unuan tagon pri pluvo, koto kaj almozpetulo.

Sekvantajn tagojn mi malrapide promenis tra Moskvo kaj observis. Jen la rimarkoj, kiujn mi notis en mia kajereto:

En sia famaĉa raportlibro pri Sovetio skribis francia verkisto Henri Béraud: mortis la rido en Moskvo. Se nur tion li skribus, oni rajtus kulpigi lin pro mensogemo, ĉar neniam estis aŭdebla pli nevera diro. Kiu sin trovis en Moskvo dum datrevenaj festotagoj kaj okaze renkontis surstrate nian tutafablan K-dinon Mario Demidjuk irante meze de nia financministro Rolo kaj lia "alter ego"[1]) K-do Hempel el Leipzig, tuj konvinkiĝis, ke reviviĝis rido kaj ĝojo. Ĉu ja eblas la ridon enteni en si, kiam Rolo spican anekdoton rakontas? Al la dubantoj mi konsilas veturi al Göteborg okaze de l' VIII-a.

Sed ridas kaj portas plezuron sur sia vizaĝo ne nur, kiuj aŭskultas nian ĉefspiciston; estas sur moskvaj stratoj tiom da ridoj kiom da fraŭlinoj fiere, firme kaj rapide paŝante malgraŭ la frosto, la pluvo kaj la koto.

Laŭ sia ekstera aspekto tute malsimilas pariza kaj moskva vojo. En Parizo fluas senĉese hom- kaj veturilondo; sur la bulvardoj ĉiusekunde oni renkontas fierajn burĝojn, luksevestitajn, irante de plezurejo al plezurejo, ĉar la tempon necesas mortigi, dume rapide sin direktas proletoj el la laborejo, ĉar necesas manĝi. Inter burĝo kaj laboristo estas tuj okulfrapa diferenco: vesta, maniera, vizaĝa. La sociaj klasoj estas tute klare apartigitaj.

[1]) Latine: alia mio.

En Moskvo neniam haltas la cirkulado. Estas ĉiam sufiĉe da loko por ĉiuj homoj kaj veturiloj. La veturilaro konsistas el malgranda nombro da taksaŭtomobiloj, modernaj aŭtobusoj, tramoj tre neoportunaj, ĉar konstante plenplenaj — tial stari devas multaj uzantoj, kaj kvanto da arkaikaj fiakroj. Vere teruraj estas ĉi lastaj. Franciano ne povas imagi tiajn veturilojn. La fiakristo estas ĝenerala maljuna kamparano, kaj lia ĉevalo estas almenaŭ tiom jaraĝa kiom li. Troti ĝi ne plu kapablas — supozante, ke iam, antaŭ multaj jardekoj, ĝi kapablis. Kaj se tempon vi ne ĝuas, petu, postulu, kriegu, skandalu, tute ne gravas: la fiakristo ne aŭdos vin, en Moskvo tempo ne estas mono. Mi profitu la okazon por konsili al kiuj intencas viziti Sovetion kaj iam devige luos fiakron. Unue interkonsentu pri la prezo kun la fiakristo. Se ekz. tiu ĉi postulos unu rublon, proponu al li kvindek kopekojn. Li certe akceptos post kelkminuta marĉandado; aliparte ne prenu ovojn en viaj poŝoj, ĉar trafinte vian celon vi nepre trovus gluan ovaĵon.

Ĉar en Francio mi multe aŭdis pri "nepmen" kaj tre interesiĝas tiun demandon, mi imagis, ke moskva "nepman" aspektas kiel pariza burĝo, kaj la unuajn tagojn mi provis renkonti burĝaspektantojn. Vane mi klopodis. Ĉiuj moskvanoj same sin vestas: ĉapo aŭ ĉapeto, botoj, palto aŭ mantelo. Apartigi sociklasanojn laŭ ekstera maniero, mi tute ne sukcesis. Burĝe aspektis nur kelkaj alilandaj delegitoj — interalie mi. Ekzistas tamen burĝoj en Moskvo, kaj

---

la retoriko, en la poezio, la greka tekniko sin trudis[29]."

Kiel oni vidas per tiu ekzemplo, eĉ eraras la sinceraj patriotoj de la plej evoluintaj nacioj, kiam ili predikas pri neceseco defendi la kulturon kontraŭ malpli evoluintaj popoloj. Kiam vera, reala supereco ekzistas sur iu ajn kampo, tiam nepre venkas tiu supereco. La armila, precipe la organiza supereco de la Romanoj donis al ili objektivan rajton ordigi, regadi la mondon. La malgrandaj civitoj, senĉese inter si batalantaj, ne povis sukcese kontraŭstari al la bandoj el rabistoj, kiuj ĝenis kaj ofte tute malhelpis la teran kaj maran komercadon. La laboremaj popoloj sopiris ordon kaj sekurecon. Kaj pro tio ne malofte okazis, ke kelkaj sin turnis mem al Romo, petante helpon kaj subtenon. La Senato pli ol unu fojon ŝanceliĝis pri novaj konkerotaĵoj. Plej ofte nur la neceseco protekti la komercadon decidigis la Romanojn entrepreni militirojn. La Roma Imperio estis tiutempe ekonomia necesaĵo. Ĝi sekve estis progresiga forto en la homa evoluo.

Sed la kulturo de la Romanoj malsuperis tiun de la Grekoj, kaj pro tio tiuj lastaj venkis senarmile sur la arta, literatura kaj scienca kampoj.

Dum pli ol tri jarcentoj la Roma Imperio konservis sian geografian unuecon en la Mediteranea baseno kaj preskaŭ sian tutan amplekson. Tiu fakto estas unika en la Historio. La Imperio de Aleksandro ja apenaŭ starigita tuj disfalis. La invadoj de la Araboj ankaŭ kreis Islaman Imperion, sed ĝi ne estis longdaŭra kaj baldaŭ dispeciĝis inter kelkaj kalifoj. La mezepoka t. n. Sankta Imperio estis nur fiktivaĵo, ekster la germana bloko. La Angla Imperio nuntempa ankaŭ ne povas esti komparata al la Romana. Ĝiaj teritorioj estas disaj; unuj estas loĝataj grandparte de elmigrintoj kaj aspektas kvazaŭ disŝiritaj pecoj el la Metropolo; aliuj konsistas el popoloj, kies moroj kaj sociarangoj estas tute malsamaj je tiuj de la Metropolo.

Aliparte, estas tre notinde, ke neniu indiĝeno el la kolonioj anglaj ludis gravan rolon en la historio de Anglio. La reĝo ja estas pure brita kaj ne hinda aŭ afrikana. Male dum la ekzisto de la Romana Imperio regis la hispano Trajano, la numido Severo, poste Sirianoj kaj Ilirianoj.

Tiuj simplaj faktoj bone montras la gradon de unueco, kiun atingis tiu giganta politika konstruo, unika en la historio. Kompreneble kreiĝis sur tiu ekonomia kaj politika substrukturo ia unueca ideologio. Kreiĝis ia patriotismo. Kiel ĉiam kaj ĉie la Romana imperia patriotismo estis esence religia:

"Kvankam en siaj koroj la Romanoj ĉesis respektegi siajn diojn, ili tamen daŭrigis tre akurate kulti al ili. Pli ol iam, dum ĉiu religia sento estingiĝis, la ritoj al la naciaj dioj kaj la diaj honoroj al Romo kaj al la imperiestro aperis kiel la simbolo kaj la signo de la romana patriotismo. La religio fariĝis ia nacieco[30]."

(Pluo sekvos) *E. Lanty.*

[29] Albert Grenier. La Romana genio en la Religio, la Penso kaj la Arto. Biblioteko de historia sintezo (1925).

[30] Ibid.

La lernado de multaj lingvoj plenigas la memoron per vortoj anstataŭ per faktoj kaj ideoj; tamen la memoro de iu ajn homo povas enteni nur difinitan kvanton da enhavo.

F. Nietzsche (Niĉe).

TRA ESPERANTIO

Pri kolektiva kaj individua korespondado

(Niaj malsanoj)

En la fako "Korespondado" de "S-ulo" oni povas trovi multe da anoncoj, kiuj alvokas al korespondado. Kaj ho, malĝojulo estas tiu, kiu sendante al koncerna adreso esperas ricevi baldaŭan respondon. Oftege li eĉ respondon ne ricevos. Multege da plendoj havas ĉiu, kiu vane serĉas bonajn korespondantojn, dissendinte pli ol 15 leterojn, kaj ricevis nenion. Tio estas nur vortoj, sed se necesas pruvoj — vi povas ilin ricevi abunde de SAT-anoj.

La samon oni povas diri pri kolektiva korespondado. Ekzistas organizoj, kiuj ankaŭ ne respondas al leteroj. Kial do tio okazas? Unue — pro tio, ke tre ofte K-do aŭ organizo post sia korespondanonco ricevas multege da leteroj, kaj li (aŭ ĝi) ne havas eĉ fizikan eblecon respondi al ĉiuj, kaj li (ĝi) simple silentas kaj respondas nur al kelkaj. Due — pro simpla nedeziro respondi al letero. Pli bone ja estas, se mi respondos al K-do el Hispanio, ol al letero ricevita el Germanio — tiel ofte diras tiuj "nerespondemuloj". Trie — pro tre malserioza rilato al korespondado. Tre ofte okazas (precipe en Sovetio!) ke de K-do, kiu ekdeziris nur studi esperanton aŭ simple — eĉ estas nur simpatianto — oni prenas monon por korespondanonco. Komitatoj kaj apartaj K-doj faras tion nur por pruvi al K-do, ke esperanto ebligas la korespondadon kun "tuta mondo". Kaj ke li nur post la anonco ricevos multe da leteroj. Venu al kursoj kaj kunvenoj, kaj vi ofte ekaŭdos tiujn konsilojn.

Jen pro kio kelkaj K-doj precipe el malproksimaj landoj havas specialan sistemon de respondoj. Laŭ ĉi tiu sistemo ili tuj post la ricevo de letero notas, ĉu al ĉi tiu letero respondi ĉu ne? Al kiu grupo ĝi apartenas? (Tralegu artikolon de K-do el Alĝerio presita en "S-ulo". Jen kial K-doj kaj organizoj ofte vane serĉas korespondantojn kaj atendas respondon!

Ĉi tiu malsano estas infekta, kaj ĉiumonate ĝi infektas pli kaj pli da SAT-anoj. Necesa estas urĝa kuracado de ĉi tiu malsano, ĉar SAT kiel kultura per esperanta organizo multe perdas pro tia malsano. Korespondfako malvaloriĝas. Anoncoj restas sen atento. Ĉi-tio certe malhelpas al SAT en ĝia agado.

Kiel kuraci ĉi tiun malsanon?

1. Necesas pli malofte presi anoncojn, kiuj rilatas al korespondado "pri ĉiuj temoj kĉl.". Ĉu vere ne ekzistas en SAT K-doj, kiuj volonte korespondas ĉu pri politikaj aferoj, ĉu pri virinaj modoj, ĉu pri salajrproblemo, ĉu pri beleco de katoj ktp.? Dume K-doj ricevas multege da leteroj kun la propono korespondadi pri iu jam difinita temo. Certe ĉiu elektas tiujn K-dojn, kiuj proponis pli interesan por li temon. Aliaj restas sen respondo! Tio estas ne normala! Necesas, ke ĉiu anonceto estu pli konciza kaj ĉiam pli klare montru la dezirojn de K-do, kiu presigas anoncon.

2. K-doj, kiuj ricevas multe da leteroj kaj ne havas la eblecon al ĉiuj respondi, devas per la sama korespondfako respondi al ĉiuj (citante la nomojn) pri sia nekonsento korespondadi kun ili.

3. K-doj ekstereŭropaj devas pli atente kaj severe verki siajn anoncetojn, por ke oni ne superŝutu ilin per leteroj!

4. EK aŭ speciale kreota komisiono okupu sin pri la kolektado de adresoj de "nerespondemuloj". Post ricevo de necesaj certigiloj pri nerespondo ĉi komisiono publikigus en "S-ulo" adresojn de organizoj kaj apartaj personoj, kiuj ne respondas.

Komisie Dim. Snejko, 603.

PS. Ĉi tiun artikolon mi verkis laŭ insistaj petoj de kelkaj eksterlandaj K-doj, kiuj preskaŭ de 2 jaroj vane provas trovi por si korespondanton en Sovetio. Same K-do G. P. de Bruin donis kelkajn pensojn por ĉi tiu artikolo.

SAT-anoj de Leipzig!

Nepre partoprenu sekvantan kunvenon, okazonta en popoldomo de Leipzig, Zeitzerstr. 32

merkredon, la 7. de marto

precize je la 20-a horo.

Ĉiu prosperigemulo ĉeestu!

Internacia kongreso en Leipzig!?

unuvespere ni petis K-don Lidin akompani nin al ili. Li kondukis nin en kafejon. Tie sidis, trinkis kaj manĝis homoj tute aspektantaj kiel laboristoj, sed dume ni trinkis glason da teo — 30 kopekojn po unu, — ili trinkis botelojn da delikataj vinoj — 3 rublojn po unu, — kaj ebriiĝis. (Unu el ili estis eĉ tiom ebria, ke li donacis al Rolo kelkajn rublojn! Profita afero por SAT-kaso.) Tiu spektaklo konsciigis min, ke en haŭto de t. n. "nepman" kuŝas honto kaj timo. Estonte kiam mi legos pri grava danĝero de burĝara reviviĝo en Sovetio, mi memore revidos tiun moskvan kafejon, kie kaŝe ebriiĝas proletvestitaj kompatinduloj.

Unu el la plej interesaj flankoj de moskva strato estas la stratvendistoj. En ĉiuj grandaj arterioj, laŭlonge de l' trotuaroj, staras longa vico de vendistoj antaŭ tabletoj. Sur la tabletoj estas aranĝitaj ĉiuspecaj objektoj, precipe cigaredoj kaj pomoj. Ofte iu aĉetas pomon kaj marŝante manĝas ĝin.

Aroj da junulinoj, kies kapoj estas kovritaj ĉu per ĉapetoj, ĉu per ruĝaj tukoj, gajigas la preterirantojn per sia kantema babilado.

De tempo al tempo oni renkontas homon, kiu purigas sian nazon per fingroj kaj poste purigas la fingrojn je sia maniko. Sendube karaj estas la naztukoj, aŭ tro longe oni devas pacienci por havigi ilin al si, ĉar antaŭ la pordo de l' kooperativoj — tiel bonguste aranĝitaj kaj lukse ornamitaj! — staras longa vosto de atendantoj vice eniri. Mi jam parolis pri tio.

Puraj estas la trotuaroj. Ĉiudekmetre pendas ĉe dommuro rubkestoj, kaj sufiĉe multnombraj estas ti-kiuj konscias, ke estas tiel facile ĵeti malpuraĵojn tien kiel teren.

En ĉiuj magazenaj montrofenestroj troviĝas Lenin-a portreto aŭ statueto. Ĉie, kien trafas la rigardo, jen li, la granda Kamarado. Ĉar scivolema mi naskiĝis, mi penis renkonti ankaŭ bildojn de aliaj famuloj, interalie Trotski kaj Zinoviev. (Tiutempe ambaŭ K-doj ne estis ankoraŭ eksigitaj el Kompartio). Vane estis mia trastrata serĉado. Tamen iun tagon, dum Amikara Kongreso, irante tra la koridoroj de Sindikata Domo, en tute malluma murangulo, mi fine rekonis Zinoviev-an vizaĝon, kiun sendube neniu vidis pro la loka mallumo. Tiun informon mi sciigas al la moskvaj Zinoviev-anoj.

(daŭrigota) *G. Salan.*

Korektoj

Rilate al art. "La juda klerikularo en Polio" (n-o 173) estas necesaj jenaj korektoj: anstataŭ — en la kinejo "Palac" en Leopolo devas esti: "Palas" en Lwôw. Ĉie, kie estas "Leopolo" devas esti "Lvovo" (Lwôw). Anst. Belza kaj Baboda, devas esti — Bobova. Anst. (Obro) devas esti (6600).

Jarlibro 1928

Dum januaro ni intencis kompili la adresaron por aperigi nian Jarlibron jam en marto, por kiel eble plej konformiĝi al la dezir-esprimo de la Lyona Kongreso; sed tion fari ni ne povis. Jam dum januaro ni estis pleje ŝarĝitaj pro la alfluego de la abonoj kaj kotizoj, kaj malbonŝance, ĝuste en tiu monato, niaj du oficistinoj malsaniĝis unu post la alia. Sekve la apero de la Jarlibro prokrastiĝos je kelkaj semajnoj. Kaj cetere ni estas tre ĝenataj, en la kompilado de la adresaro, pro la malakurateco de membroj, kiuj nur nun resendas al ni la "demandilon", kiun ili tenas depost julio.

Esperanto kaj Instruista Lab. Ligo en Britio

Jena rezolucio aperis sur la prepara tagordo de l' 6-a ĉijara konferenco de "British Teachers Labour League" (TLL — Britia Instruista Lab. Ligo), kiu okazis en Manchester (elparolu: Menĉestr) 31. 12. ĝis 1. 1. 28. Post paroladoj de 2 esp.-K-dinoj Savage kaj France (la unua partoprenis en la brita geinstruista delegacio al Sovetio kaj tiel uzis esp-on) kaj alvoko de K-do Duncan (ankaŭ spertinta en Sovetio la lingvan malfacilajon) ĝi estis unuanime akceptata:

Paragr. 48 — Internacia lingvo. — "Ke la konferenco, konsiderante unuflanke: a) ke komuna lingvo estas unu el la bazoj de l' internaciismo; b) ke lingva diverseco estas barilo por la liberiĝo de la Laboristaro; c) ke la alpreno de komuna lingvo multe faciligus la internaciajn rilatojn. Kaj aliflanke: a) ke la intern. lingvo esperanto jam ekzistas kaj funkcias plenkontentige por siaj adeptoj dum la lastaj 40 jaroj; b) ke ĝi jam disvastiĝis en preskaŭ ĉiuj mondpartoj kaj sekve jam nun kapablas liveri konsiderindajn servojn; c) ke la logika strukturo de tiu artefarita lingvo, senigita je gramatikaj esceptoj, kiuj svarmas en naturaj lingvoj, ebligas al ĉiu inteligenta laboristo ĝin lerni kompare facile. — Pro tiuj kialoj la konferenco alprenas esp-on kun la celo uzi ĝin por internaciaj rilatoj, post difinota tempdaŭro, kiel la sola oficiala lingvo de l' organizo. La konferenco decidas: a) En sia agitado konsili al ĉiuj membroj kaj laboristoj studi ĉi tiun lingvon; b) ekinterrilati kun laboristaj organizoj esp-istaj; c) difini esperantistan sekretarion, por ke li regule donu informon pri la Ligo kaj ĝia laboro al tiuj organizoj; d) anonci la nomon kaj adreson de la Ligo en la Jarlibro de SAT kiel organizo, kiu uzas esp-on en sia korespondado; e) provizi la esp. sekretarion per materialo tradukota por enpreso en Edukada Numero de "Senn. Revuo"." H. Stay, 2978, Bournemouth.

Muzikemaj kongresanoj!

Ĉiu kongresa komitato faras klopodojn, iel pliriĉigi la eksteran programon. Laŭ mia opinio la kongresanoj mem povus helpi en tio. Ekzemple okazis dum Lyon-a kongreso, ke post la tagordo germania K-do prezentis germanajn popolkantojn per citro. Diversaj K-doj ekstere starantaj aŭdis la muzikon kaj aliris. Post nelonge multaj ĉeestis por aŭskulti, kaj diversaj akompanis la ludanton per kantado. La impreso por alilandanoj estis bona. Sekve mi opinias dezirinda, ke estonte antaŭ ĉiu kongreso sin preparu iuj K-doj muzikantaj por ludi post kunsidoj, dum ekskursoj ktp., kunportante siajn instrumentojn. 1162, Leipzig.

TRA LA MOVADO

(Kroniko)

Latvio. — Riga. Latvia Lab. Esp. Societo 18. dec. festis datrevenon de Zamenhof. Ĉeestis 32 p. K-do Krastin raportis pri vivo de Z. Bone prosperas kursoj de l' sama K-do en Popola Altlernejo k. ĉe soc.-dem. partio, 2. regiono. 2. jan. la kurson vizitis angla K-do Sons el Sovetlanda esp. delegitaro k. parolis pri siaj impresoj en Sovetio. — En Tukum apud Riga fondiĝis filio de Latvia lab. esp. societo. Kurso kun 25 aŭskultantoj, gvidata de K-do Garin. Ĉie instruhelpas "Petro". 22. jan. okazis jarkunveno de la Societo. En la estraro nur estas elektitaj SAT-anoj. Poste okazinta kunveno de SAT-anoj lokaj elektis kiel peranton K-don Krastin. Adr. poŝta kesto n-o 1126, Riga, Latvio. — 30. 1. Centra oficejo de Riga-aj sindikatoj (sendependaj) okazigis paroladon pri esp. k. Laboristaro. Poste fondiĝis esp. sekcio ĉe la C. Oficejo kaj organiziĝis kurso, gvidata de K-do Garin. 5806. — **Sovetio.** — Krivoj-Rog. La konstante kreskanta intereso pri esp-o devigis la lokan esp. organizon k. distriktan komitaton de la sindikatoj, aranĝi specialajn Ŝtatajn Kursojn, por prepari instruistojn-gvidantojn de esp. rondetoj. La sindikatoj pagas la instruantojn. Partoprenas 30 lernantoj. Ĉe malfermo salutparolis K-doj de lokaj partia k. popolkleriga komitatoj. — Plue distrikta kunsido de Ruĝa Kruco decidis enkonduki esp-on en kursoj de Medicina Helpo. 50 lernantinoj vizitas la kursojn. M. Rejtman. — **Usono.** — Nov-Jorko. Dua kunveno de "Esp. Laborularo", 4 novaj membroj, inter ili 2 SAT-anoj. Pri la unua kunveno aperis longa raporto en "New Yorker Volkszeitung". K-do Weder estis aldonata kiel membro de Pres-Komitato. — Kreiĝis denove lab. grupo, sed kun la preciza devo, ke ĉiu membro dum 6 monatoj SAT-aniĝu. La grupo ricevis bonan atenton de la lab. gazetaro k. ĉeestis 14. 1. la feston de la Ferrera Moderna Lernejo (en Labora Templo). Tie la infanoj de la 3 mod. lernejoj kantis la Internacion po unu verso angle k. esperante, div. aliajn kantojn esp-e k. angle. Ankaŭ oni kantis k. parolis german- k. hungarlingve, por varbi samlingvanojn loĝantajn multnombre en la distrikto. 168.

MEMORNOTO

Represis el "S-ulo":

Ruĝa Polocu, 19. 11. 27, El Macedonio, Ruĝa Vojo, Jegorjevsk, 27. 1. 28, Junularo en Jugosl., 22. 1., Tago el mia vivo, Henthorne; Le Drapeau Rouge, Bruxelles, 16. 10. 27, Sklavigitaj kulioj (156), 28. 10., Labordaŭro en germ. industrio (159); L'Action Laique, St. Etienne, dec. 27, eksiĝoj ĉe eklezio (150/151); Le Cri du Peuple, Brest, 10. 12. 27, Nova Sacco, nova Vanzetti (164); Le Libertaire, Paris, 11. 12., Labordaŭro en germ. industrio (159), 9. 12., El Estonia malliberejo (163); L'Etincelle, Bruxelles, nov. 27, Petrolmilito (150/151); L'Effort, Lyon, 15. 1., Problemoj el Hindio, Kooperat. movado en Britio, Dek-kvin jaroj (167, 168, 169).

Enhavis priesperantajn artikolojn k. notojn:

Ruĝa Polocu, 16. 11. 27, 21. 1. 28; La Dépêche, Tours, 6. 1. Le Syndiqué du Centre, Bourges, 1. 28, L'Avant-Garde, Tours, 7. 1., L'Emancipateur, Bourges, 1. 1., 15. 1., Le Populaire, Paris, 23. 1., 30. 1., Le Cri Populaire, Creil, 29. 1., 5. 2., El Socialista, Madrid, 24. 1. (ankaŭ pri SAT).

Enhavis tradukojn el esperantaj leteroj:

Ruĝa Polocu, 21. 1. 28, Komunisto, 25. 11. 27, Blankrusia Vilaĝo, Minsk, 27. 11. 27., 9. 12., 16. 12., 20. 10., 13. 1. 28., 22. 1., 25. 1., 27. 1., 1. 2.

Esperantan tekston enhavis:

The Labour Woman, London, febr. (ankaŭ mencias SAT).

Nekrologo

La 15. 1. 1928 mortis kiel viktimo de ftizo kaj sekve de sistemo kapitalista

K-do Paul Schiller

Ni ne forgesos lian fervoron por la laborista esp. movado kaj por SAT!

SAT-rondo k. LEA-grupo Schweidnitz
(4-a sektoro).

DEMANDO

K-do Schwickerath, Benesisstrasse 32, Köln a. Rh. publike demandas la liberpensulan unuiĝon "Komintern" en Leningrad, ĉu ĝi ricevis mian leteron k. skizon ĉirkaŭe pentekoston k. kial ĝi ne resp.

Monata Esperanta Gazeto

Esperanto en Nipponlando

Bone redaktata kaj bone ilustrita gazeto en Japanio.

Jarabono: 15 sm., 3.75 sv. fr. aŭ 15 resp.-kuponoj.

Petu provnumeron (por unu resp.-kup.)!

Eldonejo:

KOKUSAIGO-KENKJŬ-ŜA

Motozono-ĉo, Kôĵimaĉi

Tokio (Nippon)

Urĝa peto!

K-doj el Eŭropaj landoj instigu viaurbajn lab. kaj kom. org.-ĵojn sendi salutojn al nia urba Laboristinaro por la Internacia Virina Tago (8-a marto) kaj al la Distrikta Komitato de la Internacia Ruĝa Helpo okaze la 5-jara jubileo (18-a marto).

Adr. **Ĉita (Siberio) poŝtkesto n-o 1.**
Resalutoj kaj aperigo en ĵurnaloj garantiata.

Atentu Sovetianoj!

Por la propagando de regnobaloto ni bezonas argumentojn por refuti burĝajn kalumniojn. Skribu kiujn avantaĝojn vi guas nun k. dum la cara epoko. — Skribu multnombre, presigu ĉi-anoncon en viaj ĵurnaloj. Adr.:

Chr. Schneider (jun.), Oberbetschdorf,
Bas-Rhin (Francio).

NIA POŜTO

5281. Via versaĵo (prilaborita) aperos okaze, verŝajne en "Lernanto".

163. Via artikoleto ne utilas por "S-ulo", ĉar tiu informo jam trairis la tutan ĉiutagan gazetaron.

536. En ĉi tiu n-o jam troviĝas unu el viaj tradukoj; la alia ankaŭ aperos, sed mallongigite pro manko de loko. Bonvolu ne skribi sur ambaŭ flankoj de l' papero. E. L.

1851. Estas preferinde silenti pri SAT-anoj, ĉe kies enterigo ĉeestas pastro.

Red.

1851. Po anonco kostas 0.50, sume 1.50 mk. g. — Vian kotizon tuj pagu.

Al kelkaj: "Liberpensulo" ne plu aperas. — Jus ni kompilas la adresaron por la Jarlibro. Adm.

SAT-anoj!

En viaj korespondaĵoj al la Administrejo ĉiam citu vian membro-numeron.

K * O * R * E * S * P * O * N * D * A * D * O

Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0,50 mk. g., ĉiu plia linio la samon. Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.
L = letero, PK = poŝtkarto, PI = poŝtkartoj ilustritaj, PM = poŝtmarkoj, bfl = poŝtmarko sur bildflanko, kĉl. = kun ĉiuj landoj, esp-aĵo = esperantaĵo.
Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

Aŭstrio.

K-do Josef Postl, Paulusgasse, 5/13, Wien III, dez. interŝ. PI, bfl., esp. gaz. naciaj kĉl. Resp. garantiata.

Ĉekoslovakio.

K-do Venceslao Lorenc, (junulo) Neumêr p. Holyŝov ap. Plzen, dez. koresp. kĉl. pri ĉ. temoj, L, PK, PI, il. gaz., ankaŭ kun muzikistoj.

Francio.

K-do Alfred Wagner (junulo), Trimbach près Wissembourg (Bas-Rhin), dez. interŝ. PI, blf. kĉl. prefere kun knabinoj.

15 lernantoj el Pariza Kurso dez. koresp. kun aliaj lernantoj el ĉiuj landoj. Sendu la leterojn al jena adreso: Marcel Bisey, 26 rue du 14 juillet, Kremlin-Bicêtre (Seine), Francio.

Germanio.

Du junaj K-doj dez. koresp. kun K-dinoj pri lab. movado, muziko, per PI, L. Skribu al Hermann Schöpe, Ob. Bolkestr. 16, Schweidnitz.

Mi deziras interŝ. per PI, PK, L k. esp. gazetoj. K-do Kurt Riemer ĉe Hanke, Burgstr. 19, III, Schweidnitz.

Mi ŝanĝas PM, stenogr. gazetojn. Deziras koresp. pri fiziokrateco k. socialismo (teorio de S. Gesell). Skribu al K-do B. Siegert, Herrenstr. 22, Schweidnitz.

K-do Alwin Döring, Leutersdorf, A. 11, i. S. ĉiam interŝ. L, PK, PI, gaz., ĵurnalojn ktp. Skribu multnombre! Resp. garantiata.

Atentu Gek-doj! Mi intencas fari boatveturadon al Odessa, el tiu kaŭzo mi petas ĉiujn, kiuj loĝas apud la "Danubo" koresp. kun mi. Adr.: Rudi Lippelt, Ledigenheim, Neckarsulm Wttbg.).

K-do Franz Genz, Lutherplatz 5, Meissen a. E., interŝ. PM.

Tutmonda geinfanaro k. gejunularo! Ni dez. koresp. pri ĉ. temoj, L, PI, gaz. Adr.: K-do Th. Mrochen, Gieselstr. 8-a, Oppeln.

Latvio.

— Korespondvesperon aranĝas Liepaja Esp. Societo, Helenes 2, Liepaja. Sendu tuj PI, L. Resp. garantiata.

Saarlando.

— LEA-grupo k. izoluloj dez. koresp. pri ĉ. temoj, L, PI, bfl. Peras koresp-aĵojn al lab. organizoj. Resp. garantiata. Adr.: K-do Hugo Strullmeier, Hauptstr. 118, Beeden b. Homburg.

Sovetio.

K-do Gregoro Miĥajlov, Komitetskaja, 74, kv. 12, Novoĉerkassk, dez. koresp. kĉl.

K-do K. Mokriŝev, Baimskaja, 20, Mariinsk, Tomsk. okr., dez. koresp. kĉl.

Studentaro de Pedagogia Teknikumo, Kremenĉug, dez. koresp. kĉl., studentoj, lab. organizoj k. instruistoj pri ĉ. temoj. Resp. garantiata.

Adresŝanĝo: Gek-doj Natalio k. Bazilo Ĵeleznjakov (7407 k. 5583) Samara, Uralskaja 29, loĝ. 3. (Antaŭe Ĵeleznodoroĵnij posjolok, Staro-Bujanskaja, 17, pli frue en Sverdlovsk).

K-dino Anna Novikova, Sormovo, Niĵegorodskoj gub., Peski, 1-a Bolniĉnaja ul. 17, dez. koresp. kĉl. Resp. garantiata.

K-dino Val. Klimova, Sormovo, Niĵegorodskoj gub., Peski, 12-a linija, 47, dez. koresp. kĉl. Resp. garantiata.

K-dino Nina Baranova, Sormovo, Niĵegorodskoj gub., ul. im Stepana Razina 33, dez. koresp. kĉl. Resp. garantiata.

K-do A. A. Ĵirjakov, (23 j. kontisto), fabriko "Zarjadze" kontoro, Ivanovo-Voznesensk, dez. koresp. kĉl. pri radio k. a. temoj, L, PK, PI.

— Esperanto-kruĵok (rondeto), Tejkovo, Iv.-Voznesensk. gub., fabriĉnij raboĉij klub, dez. koresp. pri ĉ. temoj kĉl. L, PK, PI.

— 25 komencantoj (komizoj k. kontoristoj), dez. koresp. kĉl. pri ĉ. temoj, L, PK, PI. Adr.: Ivanovo-Voznesensk, Ploŝĉadj revolucii, Pravlenie Ivgum, Esperanto Kruĵok.

— 25 gelernantoj de fervojista lernejo, dez. koresp. kĉl. L, PI, kun lernantoj. Resp. garantiata. Adr.: Dnepropetrovsk, str. K. Marks, 98 loĝ. 12, Esperanto-Komitato de SEU (Por lernejo).

K-do V. Lemeŝov, Niĵnie Kajdaki, Dnepropetrovsk, 16 str. Bolŝaja dez. koresp. kĉl. L, PI.

K-do I. Kisenko, N. Kajdaki, Bolŝaja-str. 43, Dnepropetrovsk, dez. koresp. kĉl. L, PI.

K-do A. Sidorov, Poĉtovij jaŝĉik 347, Rostov/Don, dez. koresp. pri Internacia Ruĝa Help-movado, L.

K-dino N. Gorina, Verĥne-Bulvarnaja ul. 8, Rostov/Don, dez. koresp. k. interŝ. PI kun tutmonda junularo.

K-do A. L. Samoĥin, Centraln. Poŝtovaja Kontoro, Rostov/Don, koresp. kun laboristoj de ĉl., precipe kun poŝtistoj pri div. t.

— Esperantaj rondetoj ĉe klubo de Odessaj fervojaj metiejoj, dez. koresp. kĉl. Resp. garantiata. Adr.: Odessa, Smirnovskaja. Klub Janvarskiĥ Masterskiĥ Kruĵok Esperanto.

K-do Alekseo Poĉebyt, Vinogradnaja, 19, Odessa, dez. koresp. L, PI kĉl.

— Lab. Int. kor. oficejo ĉe Gubkom SEU, poŝtkesto, 305, Leningrad, koresp. kaj peras kor. inter labor. polit. organ., espergrupoj, interŝ. mater. por preso kaj ekspozio.

— Esperantista Komitato anoncas, ke K-do S. N. Aptekman estas peranto por junulorganizoj, kom. jun. ĉeloj k. pionirorganizoj de urbo Rostov/Don. Adr.: Rostov/Don, Srednij pr. 39, kv. 6.

Atentu! Bavariaj SAT-anoj!

Multaj fervojistaj komjunuloj de Samara eklernis esp-on por havigi eblecon senpere korespondadi precipe kun gekomjunularo de Bavario, ĉar ĝi estas protektata de Samara gefervojista komjunularo. Necesas tuj pruvi eblecon de iliaj konstantaj interrilatoj per esp-o. Do, ge-SAT-anoj-komjunuloj de Bavario! urĝe sendu leterojn pri vivo kaj laboro de viaj ĉeloj, kie mankas ĉeloj — pri vi mem. Interrilatigu viajn ĉelojn kun la niaj kaj plu peradu. Niaflanke mi perados. Per praktikaj servoj ni necesigu esp-on por la socio kaj forĝu internacian solidarecon!

Mia adreso estas: **USSR, Samara, Uralskaja 29, loĝ. 3. B. Ĵeleznjakov** (5583).

Kiu aĉetas

RAZOKLINGOJN

kun esperanta surskribo?

Kiu povas peradi mendojn?

La prezoj estas jenaj:
1000 pecoj je 54,— mk. g. afrank. eksterl.
100 „ „ 10,50 „ „ „ „

Nepre mendu provkartonon k. 10 klingoj kontraŭ sendo de 1,50 mk. g. Vi estos surprizata de la bonega tranĉkapableco.

A. Reul, Würselen b. Aachen
(Germ.) Poŝtĉeka konto: Köln 43362

Se vi deziras profundiĝi en la materion de "Sennaciismo", vi nepre aĉetu kaj legu la 2-an eldonon de

A. B. C.
de Sennaciismo

Mendebla ĉe Administracio de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27.

ENHAVO:

La klasbatalo en Japanio . . . pĝ. 163
La sola en la tutmondo . . . . „ 164
Solena promeso (militĵuro) de ruĝarmeanoj . . . . „ 164
El Ameriko . . . . „ 165
El sendependa Estonio . . . . . „ 165
Tago el mia vivo . . . . „ 166
Protesto . . . . „ 166
Patriotismo — Internaciismo — Sennaciismo . . . . „ 166—67
Impresoj pri Sovetio . . . . . . „ 167
Tra Esperantio . . . . „ 168—69
Anoncoj . . . . „ 169—70
Nia Poŝto . . . . „ 170
Korespondado . . . . „ 170

Presejo: Uns-Produktivgenossenschaft, Leipzig (Germanio)